Jens Christian Hostrup,

Nun tostu por ĉiu tutjuna deculin'

tradukita de Poul Thorsen

Nun tosto por ĉiu tutjuna deculin'
Tosto por ĉiu matrono!
Tosto por Amor-intima etulin'!
Tost' por la hejma Madono!
Ek al via glas'! Ek al via glas'.
Gaje tostu pro ĉi-karulin-amas'!
Ŝi ridetas al la glas' sub via naz',
Ŝi ridetas al la glas' sub via naz'.

Nun tosto por ŝi kun floranta vangopar'!
Tosto por kiu diskretas!
Tosto por ŝi kun revanta okular'
aŭ nur per unu koketas!
Ek al via glas'! Ek al via glas'.
Gaje tostu pro ĉi-karulin-amas'!
Ŝi ridetas al la glas' sub via naz',
Ŝi ridetas al la glas' sub via naz'.

Nun tosto por ŝi kun neĝblankaj mamoj - ve!
Same la haŭtledulino!
Vivu l'edzino sukere, ĉu ne?
Gaju la am-cedulino!
Ek al via glas'! Ek al via glas'.
Gaje tostu pro ĉi-karulin-amas'!
Ŝi ridetas al la glas' sub via naz',
Ŝi ridetas al la glas' sub via naz'.

Par grasaj, graciaj kaj grandaj ĉe la fin',
junaj, maljunaj nun kune!
Tute egale - nur verŝu pli da vin'!
Tosto por ĉiuj komune!
Ek al via glas'! Ek al via glas'!
Gaje tostu por ĉi karulin-amas'!
Ŝi ridetas al la glas' sub via naz',
ŝi ridetas al la glas' sub via naz'.

Traduko de la Dana poemo "En skål for den mø i blufærdige vår!" de Jens Christian Hostrup *(∗1818-05-20 – †189211-21) en Esperanton de* Poul Thorsen *(∗1915-01-07 – †2006-01-30).*

Arg-814-1633 (2013-02-03 12:01:05)

Pri Poul Thorsen vidu la retejojn `http://www.esperanto.net/literaturo/autor/thorsen.html` *kaj* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Poul_Thorsen`.